



SALUTON !

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

18 Oktobro 2005

№ 13

Redaktoro: Araneo

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
FAX: (708) 456-2750

Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer
Vicprezidanto – Karlo Offutt
Eksprezidanto – Vilêjo Mannia
Sekretario – Viktoro Pajuk
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Estimata leganto! Permesu al mi denove skribi al vi ion interesan de nia lastmonata historio kaj proponi al vi ion samgrade interesan por estonto. Ĉu vi rimarkis, ke nia estraro pligrandiĝis? Kaj ĉu vi scias, kial? Estimata d-ino Novak trovis Statuton de nia Societo, de kiu sekvas, ke prezidinto (aŭ eks-prezidanto pasintjara) restas plenrajta membro de estraro. Do, s-ro Mannia, akceptu niajn malfruajn gratulojn!

Ankaŭ notu, ke jara raport-kunsido (denove, laŭ Statuto) devas okazi ne oktobre (pri kio mi skribis pasintmonate, pardonu min), sed NOVEMBRE. En oktobro ni devas decidi pri kandidatoj por sekva-monata balotado. Vidu anoncon en la lasta paĝo: novembra kunsido okazos (pro Dank-Tago) ne kvaran merkredon, sed kvinan, t.e. la 30an de Novembro!

Kaj kio okazis septembre?

Puramo Chong kaj Orienta Medicino

Malfacile kurte rakonti pri la homo, kiu verkis kelkajn librojn divers-lingve kaj la vivo de kiu mem meritas libran priskribon. D-ro Chong (propranome – Chong Won Cho) naskiĝis en la jaro 1952. Kiel filo de renoma orientmedicina kuracisto li jam de sia infanaĝo lernis la arton de sia patro kaj sun lia influo decidiĝis iri laŭ liaj spuroj. S-ro Chong magistriĝis en 1983 kaj doktoriĝis en 1991, ĉio ĉi pri orienta medicino ĉe Universitato *Kyunghee* en Seulo, Koreio. Li fondis kaj gvidis privatan klinikon, kie li ne nur kuracas malsanulojn, sed inter siaj dungitaj kuracistoj edukis pliajn al majstreco de sia fako.



Orienta medicino estas nur parto de la doktora Chong vivo: alian grandan parton okupis ... jes, vi pravas, Internacia Lingvo. En Esperantio li redaktis revuon de Korea E-Asocio "La Espero", estris la Asocion, prezidis en la Internacia Naturkuracista Asocio (INA) kaj nun planas, strebas fariĝi membro de nia Societo.

Por vi ne hezitu, ĉu akcepti samideanon Chong en nian organizaĵ, mi mallonge informos vin pri lia pan-laboro, pri kompleksia medicino kaj Saama akupunkturo.

Tio estas korea unika medicino, kiu originas el tradicia ĉina medicino, sed formas novan medicinsistemon per tute alia teorio, kaj estas tia fierinda kulturheredaĵo, kiun Koreio povas elmontri al la mondo kune kun tekondo – korea tradicia batalarto. Diversaj ĉinaj antikvaj teorioj estas kritikataj kaj malsame aplikataj al korea medicino. Tio instigis d-ron Chong verki la unuan libron pri nome korea kuracarto. Fondis ĝin –

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;
toll free: 1-800-ESPERANTO
(1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

26an de Oktobro – s-no Walter Cebulski prezentos propran filmon pri ... (sekreto!)

30an de Novembro – reelekta kunveno: ni sumos la jaran agadon kaj estraro raportos pri sia aktivado; kune ni ellaboru planojn por la 2006 jaro (la nova estraro preparos sin al la Z-bankado)

11an de Decembro – jara Zamenhofa Bankedo'05

Baldaŭ okazos la reelekta kunsido. Bv. sendi kandidat-proponojn por nia estraro (se eblas – kun foto kaj noto)

la majstro *Saam*, kiu antaŭ ĉ. kvar jarcentoj iniciatis unikan akupunkturaron tute malsaman ol tradicia ĉina; *LEE Jema*, kiu vivis antaŭ ĉ. 100 jaroj kaj eltrovis, ke ĉiu homo havas unikan kompleksion, kaj metis fundamentan de kompleksia medicino, kaj aliaj. Interesan eldiron de la lasta citis nia s-no sur la titolpaĝo: *Se estas nur unu potisto en urbo kun dek mil domoj, mankas potoj. Se estas nur unu kuracisto en vilaĝo kun cent familioj, mankas homsavantoj. Do nepras disvastigi medicinon, ĝis ĉiu familio scios kuracadon. Nur tiam ĉiu povos ĝui longan vivon kaj konservi sian sanon.*

Ŝajnas, ke tiu estas slogano de d-ro Chong mem. Por plia informo vidu paĝaron www.yedam.org.

Okazis en Ŝikago

Antaŭ nelonge mi trovis interesan version en poemaro de nia samsocietano Gregoro Dolgin, kiu skribis:

Tavoloj de homara histori' –
Estonton montri, certe, povas Dio
Kaj pastor dum predik' en eklezi',
Sed realigas tion sunradio
De alta Poezi'!



Kaj jen en la Kavi Gupta Galerio inter 9a de Septembro kaj 15a de Oktobro okazis persona ekspozicia de la loka pentristo Scott Anderson, kiu montras sur siaj bildojn estontecon. Vi povas demandi, kiun rilation tio havas al E-o? Jen respondo: siajn pentraĵojn li titoligas ... Esperante (kvankam kun eraroj). Malgraŭ sia juneco (n. 1972)

artisto jam en 2001 magistriĝis (Majstro de Fajna Arto) en Universitato de Chicago kaj havis kvin personaj ekspozicioj en Kalifornio, Francio (Parizo) ktp. Jen bona ekzemplo de poresperanta reklamo!

Al ni skribis:

D-ino Angelina Taremi, D en Fenikso, membro de Pasporta Servo petas sendi librojn por E-biblioteko kaj viziti ŝian bienon “Verda Domo” (almenaŭ en Interreto).

En sekvanta numero mi informos vin:

pri la vizito al nia urbo akademiano, redaktoro de la revuo *El Popola Ĉinio*, s-ro Laŭ Lum;

pri la kontaktoj kun e-istoj el nia ĝemelurbo Milano, kie fakte estas centro de itala E-movado.

Por vi serĉis la novaĵojn de la tuta E-mondo redaktoro kaj via obeema servanto. Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!



araneoesp @ yahoo.co.uk